

UEA Edukaj temoj

La Estraro de UEA kunsidas en Roterdamo de la 15a ĝis la 17a de aprilo 2011. Samloke kunsidos la estraro de ILEI en la 16a ĝis la 18a de aprilo. Sekve, la edukaj temoj estis komence traktita en la Estraro de UEA, en la ĉeesto de la prezidanto de ILEI, kun pretigis la sekvan resumon:

5.1 Laboroj en la postkongresa periodo.

Raporto: SMG raportas pri la membrokresko en ILEI, pri la nove akceptita sekcio en Serbio, pri revivigendaj kaj fondataj sekcioj (Meksikio, Armenio, Kongo DR...), pri nunaj, novaj kaj potencialaj reprezentantoj kaj kontakt-personoj. La regula aktualigo kaj ampleksigo de nia retejo estis skizita, kiel ankau klopodoj por havi en ILEI volontulajn helpantojn.

Ret-kontaktoj: Venas demando kiom ILEI starigas ret-kontakteblojn (babilejojn) al lernantoj de Esperanto – sekvenda demando – praktike plenumas tion partneroj kiel edukado_net kaj lernu_net, kaj paĝaroj starigitaj de unuopaj kursejoj au partoprenantoj en transnaciaj projektoj. La projekto Interkulturo logike devus prizorgi la temon.

Projektoj subvenciataj: Venas demando kiom ILEI en sia nomo antaŭmetas projektojn al publikaj instancoj (EU-instancoj, Unesko, UN...) Respondo estas ke ILEI mem ne multe faras tion, nek havas bonajn sukcesŝancojn. Sed niaj membroj kaj sekcioj tion regule faras, kun sukceso. Proponite, ke ILEI-anoj kunlaboru kun Landaj Asocioj de UEA por krei projektojn. SMG memorigas pri la unua Seminario pri Subvencipetado (okt, 2010), kies enhavoj devus konkretiĝi en la formo de gvidilo kiel starigi projekton kaj verki petojn.

5.2 Ekzamenoj UEA/ILEI

Raporto: CNM kaj SMG raportas. La administrado firmas, ni havas pli ol cent ekzamenantojn, sed apenau okazas sesioj kaj nur malmultaj sukcesintoj. Necesas pli klare diskonigi la diferencojn inter la tradiciaj ekzamenoj kaj tiujn de KER (ekzemple en la ILEI-retejo) kaj trovi niĉojn, kie la tradiciaj ekzamenoj povu altiri klientojn. La ekzameno por blinduloj (UK 2011) estas klara tia niĉo.

Rekono: Dezirindas iel doni pli oficialan rekonon al la ekzamenaj diplomoj – tra la Akademio, Unesko/UN au alia verŝajne ekstereuropa instanco. Komence paŝo estas eldoni ilin en nacilingvaj variantoj.

Sesioj: La tradiciajn ekzamenojn ni verŝajne ofertos en la ILEI-konferenco en 2012; esploras kiajn ekzamenojn ni ofertu en la UK en Hanojo. Dezirindas varba direktoro pri la ekzamenoj, kiel parto de la ekzamena komisiono, kies tasko estus vekti intereson kaj sesio-petojn.

Supera nivelo: Regularo ekzistas de 30 jaroj, mankas motoro. Logikaj partneroj por koncepti la ekzamenendajn materialojn estas Ilona Koutny (Poznano) kaj flanke de ILEI Duncan Charters. Apoge al tio necesas administra forto, por interalie konstati ĉu la regularo konvenas por nunaj bezonoj kaj la konceptoj de formota faka teamo. Indas sondi ĉe Grant Goodall en Usono, kiu klare havas la kvalitojn, sed dubblas pri la tempo. Klare, supera nivelo bezonas apartan sed kunlaborantan liverteamon disde la nunaj organizaj fortoj.

5.3 Ekzamenoj UEA/KER

Raportas CNM laŭ raporto de Katalin Kovats; estas regula fluo de sesioj kaj sukcesintoj. Nenio por decidi.

5.4 Financa disponigo de UEA por edukaj laboroj.

SMG prezentas refoje la peton el la buĝeto de ILEI en januaro 2011:

Apogo al Afrika agado (nun okazanta seminario en Kongo DR). 500 euroj. AKCEPTITE.

Apogo al la trijara kurso en Poznano ekde sept 2011: 500 euroj AKCEPTITE

Apogo al postsekvado de la seminario en Matanzas: praktike TAKE: 500 euroj. AKCEPTITE

Apogo al la prilingva simpozio Julio, 2011: 1000 euroj. PROKRASITA.

Pri Afriko, ILEI el sia propra afrika kaso subtenas la nuntempe okazantan seminarion en Burundo je 400 euroj.

Pri Poznano ILEI dediĉis 500 eurojn, do eblas oferti kvar stipendiojn, po 250 euroj. Nun urĝas stargi varb-kampanjon, i.a. tra ILEI-kanaloj, specife pri la haveblo de stipendioj.

Pri la Simpozio ni prokrastas la decidon al dimanĉo, kiam povos ĉeesti Radojica Petrovic, la organizanto de la ILEI-konferenco kaj simpozio.

5.5 Projekto 'esperanto125'

La projekto estis lanĉita pere de la aprila numero de revuo Esperanto. ILEI devas nun serĉi (refoje) partnerojn, konkretigi planojn kaj dediĉi ege pli da rimedoj. ILEI flankenmetis 500 eurojn por la projekto. Klare, la modesta reeĥo al la unua alvoko (nov 2010) devigos nin etskaligi la projekton. Dum la kunsido mem elformiĝis skiza buĝeto por 2011:

Enspezoj:

ILEI 500 euroj. Jam konsentita.

IEI 1000 euroj Lau propono kun kondiĉoj kiujn ILEI verŝajne povos plenumi.

Partneroj po 50 euroj, nelimigita nombro, sed atendeble 6, do 300 euroj

UEA 500 euroj proponata.

Tio kreas enspezojn de 2300 eur.

Elspezoj:

Kontribuo al starigo de retejo: 100

Kurskreo: 300

Desegnado: 200

Administrado: 1200 (principe je 5 eur hore)

Reklamado: 500

Sume 2300 eur.

UEA audis la planojn kaj konstatis la buĝeton, sed prokrastas la decidon al dimanĉo, ĉar ĉi tio estas influata de la decido pri la simpozio.

La kunsido konstatis ke la rilatoj inter UEA kaj ILEI grandlinie enordas kaj ke kunlaboro estas regula. ILEI dankis la eblon partopreni la diskutojn.